

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE.

ROK XXI. JARO.

KRAKÓW
LISTOPAD 1927 NOVEMBRO

Nr. 11. N-o

WIDNOKRĘG SIĘ ROZSZERZA.



ORAZ więcej odczuwać się daje wśród najwyższych kół inteligencji świata konieczność wprowadzenia języka pomocniczego do międzynarodowego porozumienia. Jednym z najciekawszych dokumentów, jakie uzyskaliśmy w tej sprawie, jest sprawozdanie I. A. L. A. (International Auxiliary Language Association), które powstało w 1910 r. w Stanach Zjednoczonych, zaś zreorganizowało się w r. 1925 i 1926 rozszerzając agendy przez stałą współpracę z Instytutem Wychowawczym w Genewie, kierowanym przez prof. Boveť'a, noszącym nazwę Institut Jean Jacques Rousseau. Dr. Thorndike, kierownik Wydziału wychowawczego Uniwersytetu w Kolumbii opracował metodę i kierunek dalszych prób nad językiem pomocniczym, po długich i mozolnych próbach nad wprowadzeniem języków narodowych i sztucznych zatrzymując się na języku Esperanto, jako na utworzonym najbardziej odpowiednio do potrzeb przeciętnego ucznia. Potrzeba tu bowiem tylko logicznego myślenia przy tworzeniu wyrazów i układaniu zdań, czego brak uderza we wszystkich innych językach naturalnych i sztucznych. Liga Rodziców w New Jorku mająca 1200 członków, wśród nich 17 profesorów wyższych i średnich uczelni wybrała Komitet celem dokonania prób według zalecenia Kongresu Wychowawczego odbytego w Pradze w kwietniu b. r.

Próby mają między innymi objąć korespondencję międzyszkolną pomiędzy uczniami całego świata w wieku od 8—18 lat w języku esperanto. Jednocześnie zaprowadzono kursy języka esperanto dla dorosłych, oraz dla nauczycieli.

Jeżeli Stany Zjednoczone, które dotąd uważały język angielski za samowystarczalny, przyjęły na siebie rolę przewodnią w zaprowadzeniu esperanta — sądzić należy, że teraz sprawa ta szeroko się po świecie rozejdzie.

U nas dotąd koła inteligencji zupełnie prawie izolowały się od ruchu na tem polu. Dopiero w ostatnich czasach rozpoczynają się w tym kierunku początek działania. Trzeba zaznaczyć, że Poznańska Wszechnica w tym względzie stoi na pierwszym miejscu; w ostatnich czasach liczne grono

profesorów Uniwersytetu z Magn. Rektorem Grochmalickim na czele z inicjatywy prof. St. Nowakowskiego, bierze sprawę w ręce i zapewne w niedługim czasie posłyszemy o ważnych decyzjach co do zaprowadzenia języka pomocniczego w wyższych uczelniach i szkołach średnich.

Zaznaczyć też należy, że rozrzucone dotychczas po całej Polsce towarzystwa Esperantystów po pierwszym Zjeździe krakowskim w r. z. odbytym, a obecnie po drugim odbytym w Warszawie w dniach 5 i 6 listopada połączyły się w jednej wspólnej Ogólno-polskiej delegacji, która objęła 19 Towarzystw i na przyszłość będzie reprezentowała Polskę na Zjazdach międzynarodowych oraz poweźmie wspólny plan działania celem jak największego rozpowszechnienia poczucia potrzeby jednego wspólnego języka w stosunkach międzynarodowych oraz celem zapoznania zagranicy z Polską przez tłumaczenie na język esperanto celniejszych utworów polskich autorów oraz szerzenie wiadomości o polskiej kulturze i prostowanie błędnych wiadomości, dla utworzenia możliwego pokojowego współżycia wszystkich ludów na kuli ziemskiej.

O. B.

II. KONFERENCO DE P. E. D. DELEGITOJ.

Se la unuan konferencon, okazintan en Kraków la pasintan jaron, ni povas nomi fonda, ĉar ĝi starigis fine unu centran organizajon de la pola Esperantomovado, la duan, okazintan la 5—6 de Novembro 1927, ni nomos organiza. Depost tiu kunveno Pollanda Esperanto-Delegitaro komencas vivi normale, forte subtenata de ĉiuj esp. societoj de la lando kaj entenante principe ilin ĉiujn.

La Konferenco, kunsidanta en la societejo de Pola Esperanto-Asocio en Warszawa (Żórawia 6), kunvenigis jenajn delegitojn: Prof. Bujwid kaj Dr. Rosenstock (Societo »Esperanto«, Kraków), s-ro Essigman, inĝ. Dobrzański kaj Prof. Kaus (P. E. A. -Warszawa), Dr. Muszkatblatt kaj s-ro Wiesenfeld (Konkordo, Warszawa), f-ino Weinsteinówna (P. S. E. S. -Warszawa), s-ro Trochimowski (P. S. E. S. -Warszawa kaj PEA -Przemysł), s-ro Zawada kaj Adv. Litauer (Societo »Laboro«, Warszawa), s-roj Szapiro kaj Kurjański (Zamenhofa Societo Esperanto, Białystok), s-ro Zysman (A. E. R., Warszawa), s-ro Tichawski (Societo de Esperanto-Amikoj, Katowice), s-ro Gerlich (Esp. Ligo de Silezio), Dr. Mędrkiewicz (PEA -Lublin), inĝ. Wołkowicz (Societo Esperanto, Lwów). Kune la delegitoj prezentis 24 voĉojn.

Kiel prezidanto laŭ la propono de prof. Bujwid oni unuanime akceptis Dr. Jan Mędrkiewicz, prezidanton de PEA -Lublin. Sekretariis f-inoj Weinsteinówna kaj Pasztejn.

Ĉe la komenco la kunvenintoj aŭskultas raporton de Prof. Bujwid, koncernantan la tutan Esp.-movadon en Pollando, ne nur simplan agadon

de PED., per kio la raportinto substrekas, ke PED. estas la sola gvidanto de la enlanda movado. El la raporto oni ekscias pri eldono de »Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Gdańsk«*), pri prospero de »Pola Esperantisto«, pri tre grava por nia movado konferenco de Okcidentpolaj esperantistoj en Poznań, pri kiu oni jam raportis en »P. E.«

Vigla diskutado post la raporto evidentigis profundan interesigon de niaj delegitoj koncerne ĝeneralajn esperantajn kaj pollandajn aferojn. Tre vasta agado de Prof. Bujwid estas plene kaj dankeme aprobata de la kunvenintoj.

La dua kunsido, okazinta la 6. XI. matene, estis jam komencita. Oni plezure rimarkas speciale alvenintan nian »Napoleonon« de la Oka Dron Rosenstock.

En sia skriba raporto la ĝenerala sekretario de PED., s-ro Alfus pravas, ke la Esp.-movado estas serioze pritraktata de la Registaro (Pola Esp.-Instituto) kaj de universitataj rondoj (Poznań, Warszawa). Prof. Bujwid kune kun Prof. Nowakowski kolektis en Poznań 17 subskribojn de universitataj profesoroj, kiuj deklaris agi por Esperanto; krome Prof. Bujwid interkomunikigis kun Rektoro de la Universitato en Warszawa, Pastro Szlagowski, kiu estas favora por nia afero.

En la diskutado prenas la voĉon s-ro Wiesenfeld. Ĉar la afero, kiun li traktis, tuŝas lojalecon de gvidanto de nia movado, oni devas ĝin praparoli pli detale.

Ĝis nun al Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj Esperantistaj apartenis Pola Esperanto-Asocio, kaj depost la Ĝenevo ankaŭ Rondo »Konkordo«. Ĉar la asocio kaj la rondo aliĝis al PED, Prof. Bujwid tute prave dum kusido de K. R. en Gdańsk deklaris, ke depost nun sola reprezentanto de la Esperanto-movado en Pollando estas Pollanda Esperanto-Delegitaro. S-ro Wiesenfeld protestis kontraŭ tiu ago de Prof. Bujwid, kiu estis farita »sen interkompreniĝo« kun »Konkordo«. Ne sufiĉis klarigoj de diversaj delegitoj, ne sufiĉis deklaro de Dro Rosenstock, ke laŭ la regularo de PED., ĝi estas la sola nia reprezentanto, ne sufiĉis ekzemplo de lojale aganta Pola Esperanto-Asocio, kiu eksciĝis el K. R. La reprezentanto de »Konkordo« komunikas, ke la rondo el K. R. ne eksciĝis.

Tial inĝ. Dobrzański estis devigita proponi, ke, aŭdinte klarigojn de Prof. Bujwid kaj konstatinte, ke Rondo »Konkordo« aliĝis al PED, la konferenco decidus sciigi la Rondon »Konkordo« pri la konsekvencoj, se ĝi ne submetos sin al la komuna Poll. organizo. La propono estis akceptita per 22 voĉoj kontraŭ 2 sindetenoj (Konkordo). La konferenco krome konstatas, ke la sola nacia reprezentanto de la pola Esp.-movado estas PED.

*) Havebla ĉe Eldona Sekcio de P. S. E. S., Warszawa Leszno 99 m. 5 aŭ ĉe „Pola Esperantisto“ por 1'50 zł.

Sekve oni alpaŝis al la ŝanĝo de la regularo de PED., laŭ propono de PEA. kaj P. S. E. S. Ĉar la ŝanĝita regularo estas publikigota, ni pritraktos ĝin nur ĝenerale.

Do oni decidis novan sistemon de voĉdonado, ke ĉiu delegito havu tiom da voĉoj, kiom da membroj li reprezentas, kontraŭ la ĝisnuna ne tute justa sistemo. Krome la konferenco decidis, ke asocio, ligo k. s. prezentu unu tutaĵon, ne dispecigitan en lokajn grupojn, kiel estis ĝis nun. Fine oni aldonis paragrafon pri Reviza Komisiono, kiu mankis. De nun ankaŭ la biurokrata sistemo, koncerne organojn de PED., estas multe simpligita.

Post ŝanĝo de la regularo oni aŭskultis interesan prelegon do s-ro Zawada, prezidanto de la revivigita Laborista Societo »Laboro«. S-ro Zawada donis kelkajn proponojn por plivigli la Esp.-movadon en nia lando: zorgi pri enkonduko de Esperanto en lernejojn, en radio-staciojn, elpendigi en stacidomoj Esperanto-surskribojn, organizi centrajn korespondajn kursojn de Esperanto ktp.

Preskaŭ dum ĉiu tutlanda kunveno ni povis aŭdi similajn deziresprimojn, kiuj estis pli ol unufoje subtenataj de konformaj decidoj, sed krom kelkaj agoj de apartaj asocioj (iniciato de PEA., de Dr. Czubyński) la ĝenerala propagando estis en »dorma stato«. Nun la PED. kun sia vigla prezidanto agas kaj — ni esperu — fine venkos.

Venas »liberaj proponoj«. Novaj demandoj kaj klarigoj, sed ili ne entenas ĝeneralan intereson.

Je oka horo vespere la prezidanto fermas la vere laboran, ĉar fine organizintan PED-konferencon. Ĉar dum la konferenco oni esprimis la deziron kunvoki II. Tutpollandan Kongreson, Prof. Bujwid demandas la kunvenintojn, kie ili volas kongresi. Plimulto deklariĝis por Kraków.

Post longa laboro oni volis iom amuzi kaj profitis la afablan inviton de Akademia Esperantista Rondo, kiu organizis »nigran kafon«. *M. Trochimowski.*

LA FESTO DE LA LIBRO.

LA 15 DE DECEMBRO ĈIUJARE ESTU DEDIĈATA AL LA ESPERANTO-LITERATURO.

Ĉiam plendi ne estas prudente. Ĉiam riproĉi estas tede. La ĉiam akuzata popolo fine indigniĝos kaj rajte. Kial senĉese draŝi nur vortojn? Montru la vojon ireblan kaj ĝi estos sekvata, donu rimedojn kaj ili estos uzataj!

Longajn jarojn mi serĉis vane savan ideon, kiu almenaŭ donus esperon pri dezirata rezulto. Fine la jubilea jaro alportis ĝin.

Mi partoprenis en modesta jubilea festeno, kie unu el miaj ekslernantoj, malriĉa laboristo, alparolis min: »Paĉjo, (tiel nomas min la geamikoj), ankaŭ mi festenas. Jen! Rigardu! Fine mi sukcesis aĉeti la trivoluman »Faraonon«! Liaj okuloj brilis pro sincera ĝojo, kiam li montris al mi la

multekostan verkon. Tiel ame, karese li rigardis la ampleksajn volumojn, ke mi profunde kortuŝiĝis. Mi sentis, ke eble el la kunvenintoj sola li festenas kore kaj inde la jubileon de nia lingvo, ĉar dum monatoj li devis ŝpari el sia tre modesta salajro por fari tian proporcie grandan elspezon. Nobla festenmaniero, inda por imito!

La ago de mia malriĉa ekslernanto donis al mi la ideon pri „*Tago de la literaturo*“. Mi ricevis fortan admonon deekstere per la sciigo pri la »Festo de la libro en Italujo«. Se tiel granda kaj riĉa nacio, kiel la itala, sentis la bezonon iniciati, organizi kaj aranĝi tiun feston je intereso de sia brila literaturo, tiam ni esperantistoj devas plenumi la urĝan taskon, kiu celas la popularigon de nia literaturo ĉe ĝia tutmonda publiko. Do mi decidis fari la proponon al la jubilea kongreso kaj tion mi faris per afabla interpretado de s-ano Balkányi. *La Kongreso en Danzig unuanime akceptis ĝin* kaj difinis ĝian daton — laŭ mia deziro — je naskiĝtago de D-ro L. L. Zamenhof.

La 15-a de decembro estos nia »Festo de la Libro«. Sed estas longa, peniga vojo ĝis efektivigo de la propono principe akceptita.

Ismaelo Mario Carrera kaj Umberto Fracchia, la talentaj italaj verkistoj, iniciatintoj de la „*Festo del libro*“, estas tute pravaj, kiam ili asertas, ke la »krizo de la libro estas la krizo de la publiko« kaj »se la publiko ne serĉas la libron, tiam la libro devas ekmigri al la publiko«.

Bonega, kvazaŭ mirakla ekzemplo proponas sin al mi. De nun en ĉiu klubejo estus konsilinde havi la jenan averton:

La 15-a de decembro
estas la naskiĝtago de
D-ro L. L. ZAMENHOF,
nia ĉiama spirita gvidanto
La 15-a de decembro
estas dediĉita por la
FESTO DE LA LIBRO
kulturtago por manifesti pri vivanteco
de ESPERANTO
Rememoru pri la Majstro!
Ofere laŭvolan sumon por
nia L I T E R A T U R O
kaj aĉetu almenaŭ unu libron!

Fine por havi statistikon pri la rezulto mi proponas, ke ĉiu librovendisto, ĉiu grupo bonvolu *per poŝtkarto* sciigi min, indikante la jenajn datojn: urbo . . . ; lando . . . ; nomo de la vendisto . . . ; kiom da libroj vendiĝis? . . . ; por kioma sumo? . . . La sciigojn por statistiko oni sendu ĝis 15-a de januaro 1928.

Julio Baghy,

Budapest VII, Rottenbiller u. 66.

Hungarlando.

GUSTAW DANIŁOWSKI.

EL MOTIVOJ AŬTUNAJ.

Tiel malgaje; domo malplena;
 Grilo kantetas nur.
 Velkas folioj, krono ĝardena,
 Kun vento flugas terur'.

Tra kampoj vento vasta, sovaĝa
 Hurlas per tonoj cent —
 En koron ia sopir' malkuraĝa
 Venas kun tiu vent'.

De la malĝojoj kial fulango
 Venas al mia kor'?
 Ĉu ĉar velkiĝis ĉio per sango,
 Ĉar suno estas for?

Araneajo ĉie sin trenas
 Malgaje kvazaŭ sufer';
 Gruoj ĉielon are revenas
 Al pli kvieta ter'.

La lasta frukto jam malaperis
 En mia jus ĝarden';
 Antaŭ fenestro sange suferis
 Vinber' svenante jen.

Vitrojn kovritajn per la nebulo
 Pluv' ritme batas sen fin'
 Melankolio kvazaŭ makulo
 Surverŝas tutan min.

Antaŭ la pordo per mola koto
 Kovrita estas voj'
 Pluvego ĝemas je unu noto:
 Ploro, funebro, malĝoj'...

Pluv-kaj ventplena aŭtun' vilaĝa...
 En koron kiel torent' —
 Sincera ia sopir' malkuraĝa
 Venas kun tiu vent'.

tradukis E. Rytenberg.
 St. Etienne. Loire. Francujo.

ERWIN ROSENBERGER.

LA NASKIĜO DE L' HOMO.

Brahma rigardis desupre el siaj ĉielregionoj al la praarbaro, kie simioj babilaĉis kaj kelkaj aliaj bestoj, kaj li diris: »La besto ŝajnas al mi tro simplanima; ĝi estas senzorga, tial ĝi estas tiel stulta.

Sed min tiu-ĉi sensaĝeco jam tedas. Mi volas havi beston pli superan«.

Brahma glitigis malsupren sian serĉantan rigardon en la dekmil abismojn, tra kiuj en sennombraj formoj boladas la nebuloj de la finlastaj mondsekretoj, kaj li murmuris: »Kie estas la signalo, kiu povus al mi formi pli valoran specon? Kian diferencigan econ mi donu al la nova estaĵo? Kiel mi faru limon inter la malpli supera kaj la pli supera bestaro? Mi devas nepre trovi ian ŝtuparon, kiu al mi suprenigus la beston de l' praarbaro ĝis la altaĵo de l' evoluo...

Kaj dum li meditis kaj serĉis kaj esploraŭskultis la internon de l' dekmil abismoj, subite li ekvidis hele supreniĝintan lumfulmon kaj Brahma diris: »Jen ĝi estas! Jen la vojo: unu ideon, kiu neniam antaŭe ekloĝis en ies cerbo, mi alflustros hodiaŭ al la terkreaĵo kaj tiu-ĉi ideo al mi nepre elvokos novan specon; kaj ĝi ŝanĝos plene kaj tute la vizaĝon de l' tero«.

Ĝis nun ne ekzistas besto, kiu scias, ke ĝi devas nepre morti. Al la simio tie-malsupre kaj al ĉio, kio tie flugaĉas kaj rampaĉas, mankas la scipovo rigardi en la estonton kaj ekkoni, ke iam venos tago de l' fino, de l' morto. Kiel senkulpaj kaj feliĉe-sensensaj ili petolas tie en iliaj arbaraj sovaĝejoj!

Nu, mi nobligos la beston per tio, ke mi donacos al ĝi la ideon pri morto.

De hodiaŭ ekzistos kreaĵoj, kiuj scias: ni nepre devas morti.

Tial mi metos nigrecan ombron, subtilan, malhelan krepon sur la vojo de tiuj novaj, por ke iliaj pensado kaj agado ricevu pli noblan nuancon. Dank' al la vidaĵo, kiun tiumaniere mi estigos antaŭ iliaj okuloj, ili lernos demandi kaj demandado estas la ĝermo de ĉia saĝeco. El la vorteto, kial' kaj, kiucele' fluos al ili riĉa mondo da multspecaj akiraĵoj«.

Kaj Brahma faris signon kaj sur peza, nigra flugilo ekŝvebis malsupren sur la teron la ideo pri morto.

Tiun tagon komenciĝis la historio de l' homaro.

Tamen Sarasvati, la milda edzino de Brahma, kiam ŝi vidis la melankolian ombron malsupren falanta, diris malgaje: »Ni ne plu povas fari tiun-ĉi donacon nefarita, sed mi povas mildigi ĝin per alia donaco.

Estus vere terure, se la homo devus ĉiam, en ĉiu momento de sia vivo vidteni antaŭ si la tombon. Tial mi donacos al ili, kiel akompananton de la ideo pri morto, alian povon, kiu kontraŭagos la unuan kaj refaros feliĉaj: ili nur malofte pensos pri sia morto.

Al la suferiga sciado mi akompanigos savoplenan forgesdeziron. La vero »Ni devas morti« ne estu malkonata de la homo, sed ĝi ne estu ĉie-kaj ĉiam-esta; voleme-facilanime ili forskuos ĝin el sia pensaro.

Valorplenan kaj dolorriĉan ekkonon vi sendis, ho Brahma, al via kreaĵo. Ĝi ne ĉiutempe kaj-loke fikssidu sur la supra tavolo de ilia konscio. Tion koncedu al mi, ho Brahma«.

Trad. Dr. L. D.

P O L L A N D A K R O N I K O .

Mortis unu el plej talentaj literaturistoj Gustaw Daniłowski. Tute prave Marŝalo Józef Piłsudski en la letero skribita al la Vidvino nomas lin: ĉiana, nelacigebla batalanto por la libereco; verkisto, sentanta per la koro kaj sango, militisto de la patrolanda afero, homo de kristala karaktero. Ni ĉiuj, kiuj lin konis, doloras kune.

Por plibonigi la terkulturon en Polesie, (Blankrusujo) kies loĝantaro, precipe blankrusoj, estas tre konservemaj kaj primitive kulturis sian kampon, pola ministerio de la terkulturo aranĝigas modelajn farmobienojn, kie oni enkondukas plej raciajn metodojn de sterkado per artefarita kemia sterko kaj ankaŭ aliajn science elprovitajn metodojn. Estis aranĝitaj komence kelkdekoj da tiel prizorgitaj farmbienoj po 9 hektaroj, kiuj estos transdonitaj al la kamparanoj, kiuj prenos sur sin la devon mastrumadi laŭ instrukcio de la ŝtataj instruantoj. La Pola Registaro preparas tre grandan planon de la kulturigo de grandegaj, marĉajaj terenoj, kiuj ĝis nun restis tute senvaloraj. Racia plibonigo de la vojevodejo Polesie, precipe per sekigo de marĉaĵoj, redonos al la terkulturo pli ol 10.000 kvadr. kilometrojn da tereno. Estas menciinde, ke malkulturaĵoj en Polesie prezentas preskaŭ dekonon de ĉiuj malkulturitaj teroj de tuta Polujo.

Post tiu-ĉi plibonigo la kulturo kaj eĉ vivo en la pola Blankrusujo tute ŝanĝiĝos.

UNUA KONGRESO DE LA UNIVERSITATA ESPERANTA FEDERACIO.

Okazos en Toulouse la 27—30 decembro. Jam estas fonditaj rondoj en: Lyon, Toulouse, Paris, Grenoble; oni formas universitatajn rondojn ankoraŭ en: Clermond-Ferrand, Alger, Strasbourg, Montpellier, Marseille. Dum tiu-ĉi kongreso, kiu estas unu el plej gravaj paŝoj antaŭen en nia movado, oni preparolos antaŭ ĉio la Federacian Raporton de Lyona konferenco, kiu okazis 30/X. 1926. Oni preparolos ankaŭ la estontan Internacian Universitatan Kongreson kaj rilatojn al la diversaj esperantaj organizaĵoj en eksterlando. La detalojn pri la kongreso donas: Organiza Komitato en Toulouse, Francujo, 8 Rue Baour Lormians. Kotizo 10 fr.

DIVERSAĴOJ EL LITERATURO KAJ GAZETARO.

Italujo. 12-a Kongreso de Italaj Esperantistoj en Neapolo. La 3—8 IX. okazis en Neapolo la 12-a Nacia Kongreso de Italaj Esperantistoj, kies sidejo estis la belega palaco de Neapola Komerca Ĉambro. Aliĝis la Kon-

greson la Ministro de Financoj, la Prezidantoj de italaĵ Senato kaj Parlamento, multaj Regionaj Aŭtoritatoj, la Direktoro de la Universitato de Neapolo, ktp. La kongreso disvolviĝis tre fruktodone en siaj kunsidoj, de kies rezultoj certe sekvos pli aktiva disvastiĝo de Esperanto en Italujo.

Partoprenis la kongreson portante la saluton de fremdlanda samideanaro f-ino D-ro P. Muszkatblatt el Varsovio.

La interna situacio de Esperantismo en Italujo, kiel la agado de la Itala Esperantista Federacio, laŭ la raportoj faritaj de la vicprez. de IEF Ing. R. Orenge, estis viglaj kaj aktivaj.

Salutparolado de la delegitino de la Esperantista Rondo »Konkordo« en Warszawa, f-ino D-ro P. Muszkatblatt, dum la soleno malfermo de la Itala Nacia Kongreso en Neapolo.

Saluton, belega Neapolo!

Saluton, karaj Italoj!

Saluton, gesamideanoj!

De la malproksima pola tero mi venas por festi kune kun Vi, por esprimi mian partoprenon, por montri, ke Italujo al Pollando ne estas fremda. Kien ajn Vi turniĝos, — ĉie polajn tombojn Vi trovos, ĉie pola sang' verŝiĝis, ĉie niaj fratoj kunbatalis. Kaj se tiu vero ne estas dubinda, do milfoje pli senduba ĝi estas sur itala tero. Ja la unuaj polaj legioj, la unuaj batalantoj por libereco kreiĝis sur la itala tero. Ĉiuj Vi, Italoj, trovis en via historio la faman polan nomon »Dąbrowski«, kiu la unua formis sub la itala standardo taĉmenton de polaj volontuloj. Kaj ĝis nun ankoraŭ en la pola nacia himno »Poluj' ankoraŭ ne pereis« ripetigas post ĉiu strofo la refreno: »Marŝu, marŝ' Dąbrowski, de l' itala ter' Polujon!« Ĝis nun ĉiu pola infano kune kun siaj lulilkantoj eklernas tiun strofon... Kaj mi, havante nun la eblon esprimi la sentojn de mia popolo al la Italoj, mi estas plej fiera sub la suno, ke ĝuste mi povas stari sur la tero de potenca Dante, de l' tutmonde nun glorata geniulo Macchiavelli, kaj — fino kronas la verkon — de l' plej granda nuntempulo — Mussolini.

Lando de beleco, land' de l' poezio, lando de l' arto, land' de l' muziko! — Jen staras mi sur via tero kaj klinas la kapon antaŭ la multego de l' meritoj, kiujn vi havas, antaŭ la sennombro de l' bonkvalitoj, kiujn vi posedas. Nepriskribeble belegaj estas viaj urboj, viaj kampoj, viaj riveroj, viaj bordoj, viaj maroj. Karaj, ho, tre karaj gasamideanoj! Tro mallonga estas la tempo, tro malforta estas mia lingvo, tro malriĉa mia vortrezoro por povi nun al vi esprimi ĉion, kion mi en la nuna momento travivas, por esprimi al vi, kiel en mia animo en tiu mallonga momento trapasas via tuta historio, via Julio Caesar, Marko Aurelius, Giordano Bruno, Michel Anĝelo, Leonardo da Vinci, Dante. — Viaj trubaduroj, viaj poetoj, viaj pentristoj, skulptistoj, viaj muzikistoj, viaj... Ĉu mi sukcesus menci ĉiujn? Ĉu eble estas al unu persono dum unu tago citi ĉion, kion oni povas pri Italujo diri? Lando, en kiu kuniĝis ĉio, kio havas ion komunan kun la beleco! Nacio, kiu nombras en siaj vicoj la plej famajn mondvirojn! Mi salutas vin! Mi venis de la iam malfeliĉa Polujo, por diri al vi, kiuj kaj kio vi estas. Sed... veninte, mi mutiĝis. La troa splendoro blindigis miajn okulojn, surdigis la orelojn kaj rigidigis mian langon.

Mi venis, vidis kaj... estas venkita!! Mi ne havas plu fortojn, mi

ne havas plu vortojn. Jes! mi konvinkigis pri la vera signifo de l' proverbo: »Vidi Neapolon kaj poste morti«.

El Polujo, kiu eldonis plej noblajn filojn de l' homaro, el tiu Polujo, kiu donacis al la mondo Kopernik'on, Mickiewicz'on kaj — last not least — Zamenhofon mi alportas al vi saluton.

Noblaj estis la instruoj de Mickiewicz, kiu la unua proklamis la amon inter la popoloj; idealoj — tiuj de Zamenhof. En Polujo naskigis Esperanto. Naskis ĝin la spirito: la Interna Ideo. La amon — la plej noblan el ĉiuj noblaj sentoj eldonis al la tuta mondo nia kara Esperanto. La Internan Ideon donacis al ni Zamenhof.

Mi havas la grandan honoron kaj feliĉon saluti la XII Kongreson de Italaj esperantistoj en la nomo de l' Esperantista Rondo »Konkordo« en Varsovio, societo, kiu celas unuigi ĉiujn adeptojn de la interna ideo de Esperanto, ĉiujn, kiuj daŭrigas la spiritan vojon de nia Majstro kaj kiuj kolektigas sub unu standardo, kies devizo sonas: »Per Esperanto al repaciĝo kaj Konkordo«. En la nomo de tiuj fidelaj adeptoj de la interna ideo — plej koran saluton! — Vivu Esperanto! Vivu la Interna Ideo! Vivu Konkordo inter homoj!

Vieno. Jam la 2 marton t. j. fondiĝis en V. Komercesta Esper. Junulara Unuiĝo (K. E. I. U.) Gesamideanoj, kiuj interesigas pri similaj unuiĝoj estas petataj sin turni skribe al: S-ro Maller Theodor, Wien XVII. Hernals-er str. 58/7 Austrio.

La Suno Hispana en septembra nro preparolas Jubilean kongreson. Estas ankaŭ preparolita VII. hispana kongreso en Sevilla dum novembro. Belega bildo de la Sevilla katedralo.

Heroldo de Esperanto. Tarifo kaj libro-katalogo anoncas diversajn esperantaĵojn: leterfolioj, kovertoj, poŝtkartoj kun surpriso de nomo aŭ firmo, programoj, membrokartoj. Rekomendindaj libroj el la eldonejo de Heroldo, prezentas ampleksan valoran bibliotekon. Tre inda por trarigardi kaj uzi.

Internacia Sciencia Asocio Esperantista, reklama fako, rekomendas diversajn manierojn de reklamado: glumarkoj kun surskribo: »uzu nur esperanton en la internaciaj korespondaj interrilatoj«. Cent glumarkoj po unu respondkupono aŭ egalvaloro: S-ro Rollet de l'Isle 35, rue du Sommerard, Paris 5, France.

Germana Esperantisto anoncas germanan esper. kongreson dum la Pentekosto 1928 en Potsdam. Sekretariino Hildegard Nickel, Potsdam, Blücherplatz 2.

Internacia Medicina Revuo, enhavas, kiel kutime multajn interesajn artikolojn: de la japanaj, francaj, rusaj, polaj aŭtoroj, ampleksan referatan parton pri diversaj kuracistaj temoj, raporton pri jubilea kongreso kun detala priskribo de la prelegoj, belajn fotografaĵojn. Oni vidas, ke la esperanta movado treege disvolviĝas inter vastaj kuracistaj rondoj. Jam en tute proksima estonteco ni esperas aŭdi pri la Unua Tutmonda Medicina Kongreso. Ni estas certaj, ke niaj germanaj kaj anglaj samlingvanoj helpas nin en tiu-ĉi grava entrepreno.

La Movado Paris en la oktobra nro inter aliaj publikigas interesan prelegon de sro André Lirondelle »Esperanto en lernejo«, kaj unu parton de la prelego de sro Bovet, fama direktoro de la Instituto: Jean Jacques

Rousseau en Genève. Li diras interalie, ke memorante niajn longajn studojn de la latina lingvo kaj vidante neniu progreson de la latina interparolado kun niaj gelernantoj, ni post tute nelonga studado de Esperanto rimarkas kun ĝojo kontraŭon: ni povas interrilati kun ĉiuj nacioj sen iu ajn malfacilo.

Raporto de dro Blassberg, prezidanto de la TEKA konstatas, ke Intern. Med. Revuo presiĝas en 1200—1400 ekz. kaj la elspezoj kompenziĝas per enspezoj, ĝojiga konfirmo de la venko de Esperanto en tiu-ĉi fako.

Oomoto, internacia monata organo de la universala homama asocio. Red. K. Nishimura. Preparolas Internacian konferencon en Londono de la Internacia Novidea Alianco, kiu ne povas esti vere internacia, parolante nur angle. Ni estas ĝojaj, ke Sro Deguĉi estas definitive liberigita kaj sendas al li koregajn bondezirojn.

Aŭstria Esperantisto priskribas detale jubilean Danzigan kongreson. Sro Steiner faris esperantajn raportojn por la danziga kaj alia gazetaro. Raportoj estis bonege prilaboritaj.

La Fervoĵisto estas unu el plej rekomendindaj, fakaj esperantaj gazetoj. Apud la Medicina Revuo ĝi sendube prezentas organon, kiu plej sukcese disvastigos esperantan movadon en la rondoj de siaj fakuloj. Ni ofte ĉerpos el tiu fonto niajn sciigojn. Sro Ilija Puhalo, Sro Stojniĉ, Sro Carl Viksten, sveda ŝtata fervoĵisto — merita trio, — ni ne povas hodiaŭ citi multajn aliajn, ne malpli meritajn nomojn, — garantias prosperan estonton por la disvolvigo de la esperanta ideo. Adreso de la asocio: Intern. Asocio de la Esper. Fervoĵistoj Zagreb, Stojarska cesta, Jugoslavujo.

Internacia Stenografisto. Dir. P. Flageul, Ĉefredaktoro L. Demarcy 12 rue Robert, Beauvais, Oise, Francujo.

Novy Lid Ĉeĥoslovakujo alsendis esperante skribitan artikolon, inter aliaj ĉeĥe skribitaj. Ĝi aldonas specialan propagandilon esperantan.

Katolika Mondo, Koeln Lindenthal, Germ. alsendis por recenzo la libron Naturscienco, Mondkoncepto, Religio. de Dro med. k. fil. Joh. Reinke.

La Progreso, ofic. organo de la ĉeĥoslovaka Asocio esper. Praha VII Soharska 333. Inter aliaj interesaĵoj ĝi prezentas tutsemajnan radioprogramon el diversaj ŝtatoj kaj urboj. Tre imitinda. Estas citataj: Brno, Barcelona, Breslau, Danzig, Freiburg, Graz, Gleiwitz, Genève, Innsbruck, Klagenfurt, Leningrad, Moskva, Paris, Stuttgart kaj aliaj.

Esperanto Praktiko, Berlin SW. 19 Jerusalemer str. 46—49. Kelkaj artikoloj meritas specialan preparoladon, ĉar ili estas enhavoriĉaj kaj tre interesaj.

La Socialisto, Wien, XXI Angerer str. 14. Publikigas literaturan konkurson.

The British Esperantist, ofic. organo de la Brita Esp. Asocio. Al tiu potenca asocio apartenas 106 grupoj el tuta Britlando, tri el ili loĝas en Ameriko kaj en Aŭstralio. La oficejo de la Brita Asocio, gvidata de sro Buttler, estas plej imitinda ekzemplo de bona administrado. Eble plej riĉa esperanta biblioteko.

Argentina Esperantisto, Buenos Aires, str. C. Pellegrini 238.

Esperanto Junularo, A. Neupert, Wedel str. 17. Leipzig N. 23. Germ. Interesaj komunikoj pri interkorespondado. Hina 13-jara knabo priskribas en la taglibreto siajn memoraĵojn kaj impresojn. »Sro Ma, instruisto, ruĝiĝis

pro ekforgeso de la nomo de granda konata urbo... Posttagmeze sabate en la lernejo tri samklasanoj batalis kun mi. Unu el ili min atakis de malantaŭe, alia ĵetis sin sur min de la antaŭa flanko, kaj la tria ekkaptis min je la dekstra kruro. Malgraŭ tio mi ilin rebatis tiel lerte, ke mi ilin ĉiujn tri venkis. Kun ĝojo mi sciigis la patrinon pri mia triumfo. Kaj tamen ŝi min forte mallaŭdis kaj admonis min al bona neriproĉinda konduto«... Estas dezirinde disvastigi tiun ĉi gazeton inter la junularo.

La 18 de majo estis sendata per t. s. f. la jena alvoko redaktita en kvin lingvoj: Walesa (Kimra), Angla, Germana, Franca, Esperanta: Ni, infanoj de la lando de Wales, sendas al ĉiuj infanoj en la aliaj landoj de la tero, koran saluton. Ĉu vi ne volas, ho vi, milionoj da kamaradoj, subteni per via juneca entuziasmo ĉiujn, kiuj, apartenantaj al ĉiuj rasoj kaj al ĉiuj nacioj faras ĉion eblan por ekstermi por ĉiam kaj sen sangoverŝo la malnovajn disputojn? Se ili sukcesos en sia granda kruca militiro, venos la tempo, kiam ni estos homoj, kiam ni estos fieraj aparteni al la lando, kie ni naskiĝis, ne estante pro tio devigataj mortigi aŭ malami aliajn homojn. Vivu la ligo de nacioj, la amikino de ĉiuj patrinaj, la protektantino de ĉiuj hejmoj, kaj la junularo en la tuta mondo. Sendu respondojn al sro Gwilin Davies, direktoro de la Wales Unuiĝo por la ligo de nacioj, 10. Richmond Terrace, Park Place, Cardiff, Anglujo.

Sennaciulo, ofic. organo de Sennacieca Asocio Tutmonda 23 Boyer, Paris 20.

Antaŭen, New York City 5 West 83rd St. M. Amiel.

Ilustritaj Rakontetoj, A. Kenngott, A. M. Belga Esper. Instituto Antverpeno II, rue du Petit Chien.

Revista del Ateneo N. 35, speciale dediĉita al Alvar Nunez Cabeza de Vaca, Jerez de la Frontiera priskribas esperante la okazintaĵojn de la supre nomita Hispana Kavaliro.

V I V O D E L A S O C I E T O J .

Pola Poŝta Organizajo, okaze de la IX. Tutpola Kongreso de Asocio de Poŝtistoj, Telegrafistoj kaj Telefonistoj, kalkulanta 17.000 anojn aliĝis al I. L. E. P. T. O.

Włocławek. Ĉe ŝtata Gimnazio: Gimnazjum Ziemi Kujawskiej, fondiĝis Esperantista Rondo de Junularo, sub la protekto de Direktoro, kiu permesis aranĝi esper. kurson por gimnazianoj. Kurso komenciĝis la I/IX. kun 26 partoprenantoj; gvidas ĝin prezidanto de la rondo ankaŭ gimnaziano. La rondo deziras korespondi kun ĉiuj polaj kaj alilandaj esperantaj, junularaj organizaĵoj. Esper. Rondo Juneco Włocławek, Szkolna 6.

Estas tre imitinda ekzemplo de la Junulara Iniciato. Ni deziras tutkore plej grandan sukceson al niaj junaj samideanoj kaj petas doni al ni novaĵojn pri la progreso de la studado. Nur daŭrigu vian laboron.

Kraków. Pastro Haroński, skribas, ke li kune kun Pastro Janik ĉe-estis la internacian Misian kunvenon en Poznań kaj aranĝis tie Esperanto-ekspozicion sub la titoloj skribitaj pole, france kaj esperante: Esperanto por la misioj katolikaj k. al. Estas disdonitaj 5000 propagandiloj. Ambaŭ pastroj aranĝis en Silezio propagandan fakon por ĉiuj katolikaj esperantistoj. Oni celas koncentrigi ĉiujn polajn esperantistojn katolikajn en unu organizaĵo.

Dum la lastaj du semajnoj Prof. Bujwid parolis dufoje per radio pri la signifo de la Esperanto por la internaciaj interrilatoj kaj klarigis, kial ĝis nun nur Esperanto disvastiĝas, dum oni nenion plu aŭdas pri aliaj lingvoj, kiel helplingvoj. Estonte sekvos la prelego pri la esperanta gramatiko kaj vortradikaro. Tre dezirindaj estas ankaŭ Esperanto kursoj per radio, sed tio de ni ne dependas.

Kalisz. Kaliszanin, kotoĝo redaktoro Samideano A. Lasiński jest prawdziwym białym krukiem wśród Redaktorów, gdyż pomiędzy nimi dotąd nie widzimy esperantystów, ogłasza kursa Esperanta, na które można zgłaszać się w redakcji do dnia 10 listopada. Opłata wynosi 5 zł. Nakładem Redakcji została wydana książka Prof. Czubryńskiego: Esperanto i esperantyzm. Wyd. II c. 3 zł.

Warszawa. Laborista Esperantista Societo Laboro, dank' al la vigla agado de la samideanoj Zawada kaj Kronenberg renaskiĝis kaj reorganiziĝis. S-ano Zawada publikigis artikolojn en »Pobudka« kaj »Życie Wolne« pri Esperanto. La lasta gazeto presis la resumon esperantlingve. La 4. IX. okazis solena kunveno je la ĉeesto de kelkaj reprezentantoj de fakaj kaj kulturassocioj. La 20. IX. okazis ĝenerala reorganiza kunveno. Estis elektitaj: prezidento Jan Zawada, ĝen. sekretario adv. Józef Litauer, komit. K. Haubold — sekretario — kasisto, Eug. Pasztejn — bibliotekistino, Prof. L. Kronenberg — propagando, kursoj. Krome I. Koss kaj E. Makower. Revizia kom: F. Bonkowski, St. Dmochowski, R. Jawic. Laŭ la ŝanĝita regularo Societo Laboro agadas nur inter laboristaro kaj laboranta inteligentularo. La sekretarioj oficas marde kaj sabate je la 19—21 h. Nowogrodzka 21. Kotizo: enskribpago 1 zł. kvaronjare 2 zł.

Zarząd Akad. Koła Esper. przy Żyd. Strz. Akad. komunikuje, że zostały uruchomione 2 kursa pod kier. kol. Zysmana i Stolmana. Sekretariat przyjmuje zapisy na następny kurs w połowie listopada (niedziele 7—8, czwartki 8—9 wiecz.) Sekcja propagandy przystąpiła do organizacji Tygodnia, który odbędzie się po uroczystem otwarciu w dniu 20/XI. W początku z. m. odwiedzili klub koła dwaj przejeżdżający przez Warszawę goście: red. Büneman z Hamburga i adv. Christensen z Chicago. Wizyta zbiegła się z wizytą prof. Bujwida. W miłym nastroju spędzono parę godzin, Adv. Christensen dzielił się z obecnymi swymi wrażeniami z podróży po Rosji, ostatnio odbytej. Adres: Nowy Świat 21. Są do nabycia podręczn. Carta i Borela.

Dąbrowa Górnicza. Samideanaro el Zagłębie Dąbrowskie aranĝis 9. X. festvesperon por saluti samideanojn el Ĉeĥoslovakujo. Estis interesa prelego de prof. P. pollingve, pri la geologiaj epokoj kaj klarigo de geologiaj kolektaĵoj de la Muzeo. Profesoro finis sian prelegon je alvoko: vivu esperanto! kaj promesis aliĝi al esperantistaro. En la nomo de ĉeestantoj dankis Profesoron S-ro Ĉeĥowski del. de U. E. A. kaj D-ro A. Ingster, La tuta grupo promenis tra la urbo al Popoldomo, kie okazis aparta salutado de la grupoj de: Sosnowice, Będzin, Śląsk. Poste ĉiuj amuzis ĝoje ĝis la meznokto.

Lublin. Loka Filio de P. E. A. translokiĝis kaj ĝia nuna adreso estas: Lublinianka, obok Korso. Babiladkunvenoj okazas marde, jaŭde kaj sabate de 6—8 vespere. Mil propag. flugfolioj estas disdonitaj surstrate. S-ro Cz. Pruski gvidas kurson por 12 personoj.

Hajduki Wielkie. Del. M. Janik ul. Wolności N. 29 rekomendas katolikajn eldonaĵojn: Fabiola, Parvuli (55 gr.), Nova Afriko (55 gr.). La origino de la religio (110 gr.) k. al.

ESPERANTO EN MALPROKSIMAJ LANDOJ.

Estas interese ekscii, kiel prosperas la movado inter ekstereuropaj popoloj. Jen kelkaj sciigoj elĉerpitaj el la n. 45 de Heroldo.

En Australio 9 urboj: Adelaide, Auckland, Brisbane, Melbourne, Perth, Rotorua, Sydney, Wanganui, Wellington prezentas multe pli viglan movadon. Oni formas novajn societojn, klubojn, gvidas kursojn, komunajn ekskursojn. Sydneya esp. Societo precipe vigle laboras. Regule okazas la ĉiusemajnaj kunvenoj kun paroladoj, legado de teatraĵoj kun disdonitaj roloj, koncertoj, dancoj. Unu koncerto aranĝita profite al la Centra Oficejo de U. E. A. donis kelkajn funtojn sterlingajn. Oni mencias ankaŭ viglan propagandon de la esper. per radio.

El Ĥinuĵo oni sciigas, ke en Shanghai, post la rebonigo de la ĝenerala situacio, komencas denove vigla movado. Al la koresponda kurso aliĝis jam 295 kursanoj. Sro Kenn, bone konata propagandisto, organizas hinan Esp. Instituton. La 40-jara Jubilea Festo okazis la 31/VII., dum kiu parolis multaj samideanoj, inter aliaj sro Tsao Chung Yuan, konata radiisto. Li parolis precipe pri lingvomalfacilaĵoj dum la radiodisaŭdigo, en tiel multdialekta Ĥinuĵo. En Chinkiang, Kanton, Yuling oni komencis novajn kursojn en mezlernejoj kaj en Universitato Sun San.

Pri Japanujo oni scias, ke la movado modele progresas. Okazis jam IV Esp. Kongreso de Aomori Gubernio, okazos ankaŭ XVI Japana Esp. Kongreso en la urbo Fukuoka. Okazis radio kurso en Nagoĵa, laŭ la ekzemplo de Dairen radio stacio. Du gravaj medicinaj gazetoj: La farmakologia Revuo kaj La Revuo de Medicina Instituto en Tokio akceptis la proponon de Dro Hattori aperigi la resumojn en Esperanto. En popola Universitato de Ueda okazis propagandaj paroladoj de sro Venables, prof. de Tojama komerca Kolegio kaj sro Kajima, la estro de la loka observatorio, post kiu komenciĝis esp. kurso por 70 urbanoj.

En Suda Ameriko estas fondita esper. Ligo en Asuncion (Paragvajo). En Buenos Aires (Argentino) okazas kurso, same kiel en Montevideo (Urugvajo) en Rio de Janeiro (Brazilo) progresas la movado. En S. Paulo estas tri kursoj.

B I B L I O G R A F I O.

Edmond Privat, Historio de la lingvo Esperanto. La Movado 1900—1927. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig 1927.

En la unua volumo aperinta antaŭ 15 jaroj s-o Privat rakontis la devenon kaj komencon de Esperanto. En la plej nova verko la prezidanto de la C. O. de la Esperanto-Movado prezentas al ni kiel preskaŭa okula-testanto ĉion plej gravan kio okazis de post la jaro 1900, en kiu ekkreskis la poste fama »Delegacio«. Kaj precipe tiu historio de la Delegacio estas tre objektive skizita en la libro. Ankaŭ ĉiuj aliaj okazintaĵoj antaŭ kaj post

la milito estas tre koncize kaj juste prezentitaj. Ni legas kun vera intereso pri la siatempa konflikto Cart-Bourlet, pri la »rajtigataj delegitoj«, pri la kontrakto de Helsinko, kiu fine solvis la konstantan dumkongresan problemon de organizo. En apartaj, ĉapitroj kiuj bele elfinitajn formas tutojn ni estas informataj pri la progresoj de nia lingvo en radio, en la laboristaj rondoj, en la Ligo de Nacioj ktp.

Unuvorte, la verko estas inda je la famo, kiun ĝia aŭtoro jame posedas pro la multaj antaŭe aperigitaj siaj verkoj.

Aparte nin interesis la lingvaĵo de Privat. Kiel ĉiam tre mallongeca, riĉa je lingvaj bildoj (frakasa ŝaŭmo) ĝi estas, kiel ni konstatis ofte, ankaŭ ĉifoje iom alia ol la ĝenerala kuranta lingvo. Ne tute mi konsentas kun »droni« anst. dronigi (p. 93); »ekliterato« (p. 22); »per la lasta bardo« (p. 177) anst.: farita de la lasta bardo, aŭ: aŭdigita de la lasta bardo; »intereso« anst. procentaĵo; »de l' 2-an ĝis 8-an de Aŭg.« anst.: de la 2-a ĝis la 8-a; »kion oni povas nomi la vivan ĉarmon de Esp.« anst.: la viva ĉarmo (predikato) (p. 192).

»Krom Dro Zamenhofon« (p. 88) kaj »sidas 9 jaroj« (p. 75) estas evidente preseraroj, samkiel »fondigi« sur paĝo 116 anst. ŝajne: fandiĝi, se la aŭtoro nepre volis uzi bildan esprimon (fakte alia ne taŭgas). Ĉu mi bezonas aldoni, ke la kritikitaĵoj ne forprenas de la verko eĉ iomete da ĉarmo kaj legindeco? Niaj esperantaj stilistoj lernos multege de la plej nova libro de Dro Privat, pri tio ni ne dubas. Kaj nia »postmilita« kolegaro studos ĝin profunde, lernos koni la esperantomovadan tradicion kaj ĉerpi el ĝi novan entuziasmon, tiel kiel mi mem faris.

Prosper Merimée, *Mateo Falcone*. El la Franca tradukis J. Borel, 1926. Rudolf Mosse, Esperanto fako, Berlino*).

S. An-ski, *Dibuk*. El la juda lingvo tradukis Izrael Lejzerowicz, L. K. Eldonis J. Alfus, Kraków XXII. Aleja Dembowskiego 10.

Ilustritaj Rakontetoj kun demandoj, de J. Kennigott, Belga Esp. Instituto, Kleine Hondstraat, 11, rue du Petit Chien, Antverpeno.

Jen tri diversspecaj eldonaĵoj. La unua formas la unuan kajeron de la Mosse — aj malkaraj literaturaĵoj, kiun, kiel konate, jam sekvis multaj aliaj. La traduko de s-o Berel estas preskaŭ klasika, ĉar s-o B. estas malnova verkisto en Esperanto. Oni rimarkas la malnovajn lingvajn esprimojn, kiel »de antaŭ«, anst. de post, k. s. Mateo Falcone mem estas fama en la tuta mondo, ankaŭ la aliaj noveloj de Merimée estas vere legindaj.

Dibuk estas alia speco de literaturaĵo. En la lastaj jaroj fama hebrea, (ne juda) artistaro ludis ĝin sur la diversaj scenejoj. Kiu ne ĉeestis tian prezentadon, nepre kaptu la okazon konatigi kun tiu unika dramo. La traduko estas klasika, ĉiuj gramatikaj kaj ceteraj lingveroj estas senhezite imitindaj. Precipe spertaj esperantistoj ĝuegos legi kaj ricevi iom da enrigardo en la hebrean vivmanieron kaj legendaron.

La tria verketo estas didaktikaĵo por infanoj, verkita nur en Esperanto, kun demonstraĵaj bildetoj. La libreto estas tre rekomendinda kiel helpilino por paroligi la kursanojn.

Dr. Leopold Dreher.

*) En la No. 11 de P. E. erare estas menciita la eldonejo de la Tutmonda Biblioteko; devas esti: Rudolf Mosse.

RESPONDOJ DE LA REDAKCIO.

S-ro Max Kloss, Katowice. Ni tre dankas Vin por via afabla laŭdo koncerne la lastan Nron de Pola Espo. El via artikolo ni rimarkas, ke vi ne tre ŝatas nian ne tro grandan moviĝemon de instruistaro-generale. En Polujo la instruistaro ne multe interesigas pri esperanta movado.

Sed ni opinias, ke la afero post nelonge iros tute alie. Ni faris kelkajn favorajn paŝojn en tiu-ĉi direkto; oni jam komencas organizi la instruistaron en Warszawa, Poznań, Kraków; do fine la movado iom post iom disvolviĝos. Oni ne devas forgesi, ke jam nun estas multaj ne organizitaj instruistoj, kiuj tute modeste, kvankam senorganize laboras por nia afero.

Fraŭlino L. Zamenhof. Kun danko ni ricevis Vian vere kortuŝan interparladon kun la skribmaŝino de Via neforgesebla Patro. La artikolo estas rezervita konsente kun via deziro, por decembra Nro.

S-ro Dir. Józef Orzech, Tarnów. Tre interesa traduko por la decembra Nro.

S-ro Maurer, Wien. Red. de Kosmoglott. Ni volonte sendos al vi kelkajn Nrojn de nia Gazeto. Sed ni devas konfesi, ke la lingvo ne multe nin interesas. Ni elektis Esperanton, kiel plej disvastigitan, facilan, logike konstruitan lingvon.

ADMINISTRACIAJ SCIIGOJ.

I. GARANTIA FONDO DE »POLA ESPERANTISTO«.

Por Garantia Fondo de P. E. pagis jam:

F-ino Weinsberg por V. — 5 zł., por VI. — 5 zł., por VII. — 5 zł., por VIII. — 5 zł., S-o Dro Rosenstock por IX. — 10 zł., por X. — 10 zł., S-o Dro Róbin (Warszawa) por VIII. — 20 zł., S-o St. Pęksa (Czarny Dunajec) por VIII. — 10 zł., S-ino Rubinstein por IX. — 10 zł., por X. — 10 zł., S-ino Neuberger por IX. — 10 zł.

II. GARANTIA ĈENO DE »POLA ESPERANTISTO«.

1. S-ino Marja Landau pagante 2 zł. alvokas S-inojn: Rubinlicht, Sessler, F-inon St. Czerwińska kaj S-on Hamburger (ĉiuj el Kraków) kaj S-on Zajączkowski (Warszawa).

2. S-o Jakób Leibel pagante 7 zł. alvokas: S-on Douglas P. Boatman (Anglujo).

3. S-o Schuldenfrei (Bobowa) pagas 2 zł. kaj alvokas pagi laŭpovan sumon ĉiujn, por kiuj Esperanto estas kara.

!! V I V U S E K V O N T O J !!

NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON POR J. 1928!

ABONU MEM KAJ VARBU ANKAŬ ABONANTOJN POR LA SOLA
ESPERANTA GAZETO EN POLLANDO!